

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA TEKNIKA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Jarabono: 20 bulgaraj levoj
0.50 sv. fr. aŭ egalvaloro

Adreso: Sofio, Poŝtkesto 233

Anoncoj: 2 levoj je kvadrata
cm. Anoncetoj: 1 levo je
vorto aŭ mallongigo

ANTAŬEN!

Pasis la brile aranĝita 18-a kongreso de nia Asocio. De Stara-Zagora ĉiuj partoprenintoj forportis grandan nombron da agrablaj rememoroj pri amike travivitaj belaj momentoj. Du tagoj da serioza laboro kaj unu tago da amuzo tenis kune la bulgarajn esperantistojn kaj la fremdlandajn samideanojn, kiuj afable vizitis la kongreson.

La amuzajoj, vere, lasis neforgeseblan impreson, sed ankaŭ la plenumitaj laboroj estis sukcesplenaj.

Tion montras la multenombraj sencplenaj decidoj kaj la gravaj rezolucioj koncerne al la estonta agado de nia Asocio.

La nova CK ricevis malfacilan taskon. Multe da penoj, multe da zorgoj, multe da klopodoj estos necesaj por plenumi tiun taskon. Nelacigebla energio kaj neŝaĝebla bona volo pravigi la fidon de la kongreso ne mankas al la membroj de la nova CK. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas por la plenumo de la granda tasko. La CK bezonas la efikan helpon de ĉiuj esperantistoj, de ĉiuj esp. societoj.

Tiu helpo konsistas precipe en baldaŭa aliĝo de la societoj al la Asocio, en ĝustatempa sendo de la jaraj kotizoj kaj de la abonpagoj por la organo de la Asocio.

Unuvorte, la efika helpo konsistas antaŭ ĉio en la ĝustatempa sendo de financaj rimedoj, ĉar sen tio oni ne povas atendi ne-riproĉeblan plenumon de la tasko. Kaj per la lasta, kongreso kaj statuto ŝargas la CK-on.

La unuanimeco, kiu karakterizis la kongreson en Stara Zagora devas esti translokigita en la mezon de la esp. societoj. Zorgo pri bona kono de Esperanto kaj propagando de niaj celoj, de la veraj intencoj de nia movado, kaj de nia kara lingvo neniam ĉesu!

Neniaj politikaj, neniam religiaj demandoj aŭ okazintaĵoj embrasunian paŝon. Antaŭen ni iru neŝanĉeliĝe al la sola celo: disvastiĝi per ĉiuj laŭmoraj rimedoj kaj laŭ la lokaj kondiĉoj la Zamenhofan lingvon, ĉiam unika, neŭtrala internacia rimedo por interkompreniĝo inter la popoloj.

Antaŭen al nia nobla celo!

GEORGO AKTARGIEV

Ni turnas la atenton de nia legantaro al la kongresrezolucioj presitaj en la jena numero. La societoj kaj la izolaj samideanoj bone konsideru ilian enhavon kaj faru la necesan por la efektiviĝo de la ideoj en ili esprimitaj. Ni staras antaŭ la sojlo de novaj venkoj. Nepardoninda peko estus nia neorganizemo,

Nia 18-a kongreso

Ĝi okazis en Stara-Zagora, la 19, 20, 21 — VII. j. k. Partoprenis ĝin reprezentintoj de 14 societoj kaj multaj gastoj — inter la lastaj du eksterlandaj: Polizoidis (Grekujo) kaj Mustafa (Java). Detalan raporton pri la laboro de tiu kongreso ni ne donos ĉi-tie. Sufiĉas, ke ni povas publikigi la rezoluciojn, kiuj ĉefe ilustras la seriozan kongreslaboron kaj kiuj devas esti konsiderataj de ĉiuj esperanto-societoj en nia lando. Ni bondeziru, ke la ideoj kaj la rekomendoj esprimataj en la rezolucioj realiĝu dum la nova asocijaro por la prospero de nia afero!

1. Rezolucio pri organiza vivo de la societoj.

La XVIII Bulgara Esperanto-kongreso, konsiderante, ke la bonstato de la Asocio dependas ĉefe de fortaj kaj vivkapablaj lokaj organizaĵoj, kiuj organizas la esperantistojn en la tuta lando, donas jenan gvidlinion por la laboro de esperanto-societoj kaj lokaj gvidantoj de la enlanda esperantomovado:

Ĉiuj esperanto-societoj altiru al organiza kaj kultura vivo la esperantistojn en siaj regionoj, kreante viglan societan vivon; ĉiu esperanto-societo formu kvazaŭ intiman rondon familian, en kiu ĉiu ano povas trovi apogon; ĉiu esperanto-societo estu lernejo ne nur de bona parola lingvo, sed ankaŭ de homarsentoj.

2. Rezolucio pri presorganoj.

La XVIII Esperanto-kongreso en Stara-Zagora priparolinte la bezonojn de la Esperanto-movado en la lando, decidis:

La Bulgara Esperantista Asocio havas du presorganojn: „*Bulgara Esperantisto*“, kiu servas kiel teknika kaj organiza ligilo kaj „*Balkana Konkordo*“ — literaturscienca organo, subtenata kaj eldonata en kompreno kaj kunlaboro kun la Esperanto-

organizaĵoj de ĉiuj balkanaj landoj.

La devo de ĉiu bulgara esperantisto estas aboni ambaŭ gazetojn — ilia malkara abonpago ebligas tion al ĉiu; la prospero de la movado devigas al tio.

La momento ne permesas la ekziston de plia esperanto-gazeto en nia lando, kiu nur disigus fortojn, nenion alportante por la kresko kaj fortigo de la movado.

La kongreso malpermesas al grupoj eldoni proprajn gazetojn.

3. Rezolucio pri Esperanto en lernejoj.

La XVIII Bulgara Esperanto-kongreso, okazinta en Stara-Zagora la 19—21 aŭgusto 1931, konstatinte ke postkiam dum jaroj la Esperantomovado en la lando estis je ĉefa loko inter la movadoj en la ceteraj landoj, dum la lastaj jaroj ĝi jam sufiĉe postrestas en la komuna movado por internacia helpa lingvo; ke la internacia helpa lingvo estas de speciala graveco por malgrandaj landoj kaj popoloj, kies lingvo estas nekonata ekster la limoj de la lando, ebligante malkaran kaj rezultigan rilatadon kun la cetera mondo, ĉu propagandcele, ĉu por alia bezono,

decidis:

1. Petas por nuligo de la cirkulero de Ministerio de Popola Klerigado, kiu malpermesas al esperanto-societoj gvidi kursojn en lernejoj kaj al lernantoj lerni Esperanton. Petas permeson por la restarigo de lernantaj esp. societoj;

2. Prezenti al S-ro Ministro de Popola Klerigado peticion pri la reenkonduko de Esperanto kiel lernobjekto en la bulgarajn lernejojn, restarigante la staton de ĝis 1923 jaro.

3. La rezoluciojn oni prezentu per delegacie al s-ro la Ministro de Popola Klerigado.

Bulgara Esperanto-Instituto

I. EKZAMENA KOMITATO

La ekzamenoj en St. Zagora

Dum nia dekoka kongreso en St. Zagora (19—21 julio 1931) la Ekzamena Komitato ĉe BEI okazigis ekzamenojn pri Esperanto. Aperis ok kandidatoj por la ekzameno pri instrukapablo. El ili sukcesis kvin en la ekzameno pri instrukapablo kaj unu en la ekzameno pri scipovo de la lingvo.

La materialo de la skribekzameno estis:

1. Reproductado (rakonto per siaj vortoj) de la rakonto „Konfeso de cigano“, aŭ „Ruso kaj tataro“, eltirataj el FK.

2. Traduko de teksto el „La feino“.

3. Analizo de la sama teksto: eltirado de substantivoj, adjektivoj, adverboj, korelativoj k. t. p.

Demandoj donitaj dum la parola ekzameno:

- 1) Infinitivo;
- 2) Akuzativo;
- 3) Transitivaj verboj kun sufikso „ig“;
- 4) Korelativoj;
- 5) -ulo, -ano, -anto; -isto;
- 6) Vivo de Zamenhof;
- 7) Adverboj;
- 8) Gradoj de komparo;
- 9) Ecoj de la internacia lingvo;
- 10) -inda, -enda, -ata, -ebla;
- 11) Participoj;
- 12) Louis de Beaufront.

Por la estontaj ekzamenoj ni donas plenan demandaron en unu el la n-roj de B. E.

Nia statistiko

La Ekzamena Komitato komencis fari statistikon pri lektoroj de Esperanto, kiujn oni povas trovi ĉe tuja serĉado. Krom en Sofio, ni notis lektorojn en ĉ. 20 lokoj. En kelkaj gran-

daj urboj ni ne konas tiajn. La societoj prizorgu la trovon de lektoro en siaj urboj. La lektoroj devas esti ekzamenitaj kaj kontrolitaj de la Instituto. Por ke nia statistiko estu pli preciza, la societoj kaj izolaj samideanoj informu la Instituton pri la stato de la afero. Ĉu en ilia urbo estis lektoro de Esperanto, ĉu oni povas trovi k.t.p. La favoron de la registaro ni devas jam utiligi, sed nur post zorga pristudo kaj kontrolo de niaj fortoj.

Ekzamenoj okazos ankaŭ dum la tagoj kiam vizitos Sofion s-ro Šerer.

II. VORTARA KOMITATO

Kiel oni ne devas skribi kaj paroli en Esperanto

Именителниятъ падежъ (nominativo)

Именителниятъ падежъ е тази форма на сжществителното, въ която се поставя подлогътъ (деятелиътъ). Въ този падежъ сж дадени сжществителнитъ и прилагателнитъ въ речницитъ. Именителниятъ падежъ е основната форма на сжществителнитъ и прилагателнитъ, тъй както неопредѣленото наклонение (infinitivo) е за глаголитъ.

Мнозина, просто отъ страхъ да не пропуснатъ нѣкой винителенъ падежъ, употребяватъ последния и тамъ, кждето не трѣбва. Въ бр. 1 на сп. „Danubo“, издавано отъ Русенското есперантско д-во „Solisenск“ на втора страница, първи: стълбецъ, пети редъ четемъ: „... sed tamen plugarjn jardekojn estas necesaj“.

Въ втори брой на сжщото списание на последния редъ на първа страница четемъ: „... estas atingebla sukcesoj, ...“. На стр. 11 сжция

брой първи стълбец р. 28 срещаме изречението: „Tio estu nian unuan taskon“.

Въ третия брой въ уводната статия (третия новъ редъ) четемъ: „Plej bona okazo por unu pli vasta trarigardo de nia movado estas la tagojn, dum kiuj...“ На последния новъ редъ: „La analizon, kiun ni faros de niaj agadoj kaj fortoj, devas esti la enirpordon, . . .“.

Да се изпусне винителниятъ падежъ, тамъ, където трѣбва да се постави, може поради бързане и не е толкова голѣма грѣшка, колкото да се постави тамъ, дето не трѣбва.

Горнитѣ грѣшки сж направени:

1. Поради навика, щото думитѣ, които означаватъ време да се поставятъ въ винителенъ падежъ (като обстоятелствени допълнения за време). Сжщо и думи, които означаватъ мѣрка. Въ горнитѣ примѣри, обаче, „plugaĵ jardekoj“, „la tagoj“ сж тѣкмо подлози въ изреченията и непременно трѣбва да стоятъ въ именителенъ падежъ.

Другъ е случаятъ ако кажемъ:

„Ni kunsidas tri tagojn“. Тука въ винителенъ падежъ е поставено обстоятелственото допълнение за време.

2. При „estas atingebla sukceson“ грѣшката е произлѣзла, поради свързката по смисълъ съ изречението „oni ne povas atingi sukceson“. Въ втория случай падежътъ на „sukceson“ зависи отъ „atingi“, който е преходенъ глаголъ (означава действие, което излиза отъ едно лице и се насочва и пада върху друго, именно върху „sukceson“). Въ първиятъ случай падежътъ на тази дума зависи отъ глагола „esti“, който не е преходенъ, а само изразява състояние.

3. Сжщото важи и за падежа на думата, която изразява нѣкое

качество на подлога (атрибутъ). Въ изречението „La analizo, kiun ni faros de niaj agado kaj fortoj, devas esti enirpordon“, . . .

„analizo“ е подлогъ и непременно трѣбва да стои въ именителенъ падежъ; „enirpordon“ е атрибутъ на думата „analizo“ и сжщо трѣбва да стои въ именителенъ падежъ.

Сжщиятъ е случаятъ при изречението: „Tio estu nian unuan taskon“.

Тѣзи и други още грѣшки, които се намиратъ въ списанието и, за които по липса на мѣсто не ще говоря, ни каратъ да посъветваме нашитѣ русенски съидейници: „Изучете по-хубаво езика, като наблѣгате най-вече на винителниятъ падежъ, и чакъ тогава издавайте списание!“ Съ такива издания се принася голѣма вреда на движението, защото докато едни съ голѣми усилия се трудятъ да оправятъ езика на начинающитѣ, други създаватъ у тѣхъ множество погрѣшни навици. Тѣжко и горко на онѣзи, които биха учили езика отъ подобни учебници и списания!

S. St. H.

Кокошката снесе яйце

Мнозина, сигурно поради недостатъчно разбиране на този глаголъ, се чудятъ какъ да го преведатъ на Есперанто.

Да направимъ малъкъ анализъ:

Глаголътъ „снесе“, „снася“ съдържа освенъ окончанието си, две главни съставни части: представка „с“ и коренъ „нес“. Той е сложенъ глаголъ и има сжщия коренъ, който иматъ и глаголитѣ донасямъ, понасямъ, изнасямъ и др. Представката „с“ пѣкъ има значението на есперантския предлогъ „de“. Като предлогъ, се употрѣбява въ руски езикъ съ сжщото значение и сега,

Това значение личи въ примѣритѣ: слизамъ, свалямъ, снемамъ и др.

Значи на български този глаголъ се разлага на две главни съставни части, които сж представка „с“ и коренъ „носъ“.

На френски това значение има глаголътъ „prendre“. Той произлиза отъ латинския глаголъ „ponere“ съ значение полагамъ, поставямъ, турямъ. Огъ корена на сжщия глаголъ произлизатъ думитѣ „deponi, pronomi, ekspozicio, disponi“ и т. н. съ значение отлагамъ, предлагамъ, изложба, разполагамъ и т. н.

На Есперанто общото въ значения на тѣзи глаголи се съдържа въ глагола „meti“.

Прочие, за горната смисълъ се употребява глаголътъ „meti“ или „demeti“. Нашето изречение, въ такъвъ случай ще гласи: „La kokino (de)metis ovon“. Въ първата часть на „tra la mondo“ намираме пословицата: „Malbona kokino de-

metas malbonajn ovojn.“

Можемъ да употребимъ и глагола „doni“ както при „fruktodona“ и др. подобни думи.

S. St. H.

III. HISTORIA KOMITATO

La Historia Komitato posedas unu ekzempleron de la gazeto „Konsolo“. Ĝi estas unua kaj certe la lasta. Ĝi aperis en T. Pazarĝik dum oktobro 1930 kiel organo de Asocio tutmonda „Bona Samaritano“. Legante ĝin, eĉ komencantoj komprenos, ke ĝiaj redaktoro kaj kunlaborantoj tute ne konas Esperanton. La eraroj estas tiom multaj, ke oni ne povas ilin montri. La plej simpla uzo de la akuzativo estas konfuzo.

*

Pri ĉio, koncernanta la agadon de la Instituto, oni skribu al ties sekretario (Adreso: Poŝtkesto 233 — Sofia), ĉiam indikante la respektivan Komitaton.

Enlanda kroniko

Sofia. La kunvenoj de la loka societo plivigliĝis senteble. F-ino Nojaroва — kiel delegitino en la 18-a kongreso — donis sian raporton. S-ro Pamporov paroladis pri siaj impresoj tra Eŭropo.

La 24. IX. j. k. okazos la ĝenerala jarkunveno. Estas invitataj ĉiuj membroj partopreni ĝin.

Dupnica. Societo „Rila Verda Stelo“ en jara kunveno elektis honoran prezidanton s-ron Todor Mijorov kaj honorajn membrojn s-rojn Georgi Bogadanov kaj Al. Sakelarijev, kiuj en la pasinto senlace agis por la prospero de nia afero en Dupnica. Elektita nova estraro: prez. Kosta Slavov, sekr.-kasisto Toma Mijorov, bibliotekisto Stef. Veselinov. Kontrola Komitato: Adela Eŝkenazi kaj Boris

Drenski. La societo sendis al C. K. membrokotizon de 270 lv. Jen imitinda ekzemplo de akurateco!

Sevlievo. La intereso de la urbano al Esperanto kreskas de tago al tago. La 6. IX. j. k. paroladis s-ano S. St. Hesapĉiev pri „Esperanto kiel internacia lingvo“. Baldaŭ kursoj ekfunkcios.

S-ro Iv. H. Krestanov vizitis la urbojn Teteven, Trojan, Strelĉa, Panagjuriste, en kiuj li faris paroladojn je temo: „La internacia lingvo kiel faktoro de klerigo“.

— La kongrestombolo estos tirata 15. X. j. k. La prokrasto okazas pro la malzorgemo de la societoj en Ŝumen kaj Varna. Urĝas, ke ili aranĝu ĉion en plej baldaŭa tempo.

La numeroj de la gajnintaj biletoj estos publikigataj en „B. Esperantisto“.

Sciigoj de C. K.

— La elektita en la 18-a kongreso CK de BEA havas la jenan konsiston: Prezidanto — G. Aktarĝiev, vicprezidanto — D-ro At. D. Atanasov — Agro, sekr.-kasisto — S. St. Hesapĉiev kaj membroj: S. Nojarova, L. Marikin kaj Hr. Popov.

La adreso de BEA restas la sama: Postkesto 233 — Sofia.

— La CK de BEA jam sendis sian unuan cirkuleron al ĉiuj societoj. Oni bone konsideru ĝian enhavon!

— La sekretarioj de la societoj

regule interrilatu kun la CK. „Bulgara Esperantisto“ esperas al ties kunlaboro.

— Oni komencu la kolektadon de abonoj al „Bulgara Esperantisto“. Ĉiu ano de la societoj devas ĝin aboniti!

— La societo „Suno“ en Dupnica jam sendis 270 lv. kiel kotizon al la Asocio. La CK dankante al la fervoraj samideanoj en Dupnica, esperas, ke ilia ekzemplo tuj estos imitita de la ceteraj societoj!

ОТЪ ТУКЪ - ОТЪ ТАМЪ

— Въ отдѣла „En kelkaj linoj“, сп. „Esperanto“ — Женева (бр. 7—8) споменава за „Balkana Konkordo“ (бр. 5—6), като между другото пише: „много интересенъ брой и непременно всѣки трѣбва да го има“.

— Въ сѣщия брой на „Esperanto“, въ отдѣла „Turismo“, отбелзватъ и книжката пжтеводителъ за Варна. Сѣщото направиха свое-временно и много други междуна-родни еспераатски списания като „Heroldo de Esperanto“, „Oomoto internacia“ и др.

— „Balkana Konkordo“ е общия органъ на балканските есперантисти. Съ своя интересенъ и разнообразенъ материалъ, написанъ на свършенъ Есперанто, той представлява отлично четиво за всѣки есперантистъ. Абонирайте се — абонирайте и вашитѣ приятели! Годишненъ абонаментъ 80 лв., изпратени

съ пощ. записъ или въ препоржчано писмо на адресъ: „Balkana Konkordo“ — пощ. кутия 233 — София. Годишниятъ абонаментъ почва отъ септ. т. г. и трае до августъ ид. г.

— Ekde 15. IX. j. k. en Sofia komencis aperi nova bulgarlingva semajna journalo „Balgarska kultura“ (Bulgara kulturo) kun la tasko pri-trakti sociajn kaj literatursciencajn problemojn. Ĝia aranĝanto — Tonĉo Conevski — havas la belan ambicion igi la journalon vera tribuno de la humanaj ideoj kaj movadoj en nia lando. La jam aperintaj du numeroj sentigas al ni guston pri enhavo kaj precipe pri teknika aranĝo. Aboninda journalo, des pli, ke ĝi regule enhavos rubrikon pri kaj en Esperanto.

Jarabono — 100 lv., duonjara — 50.

Adreso „Balgarska kultura“, Bulv. Dondukov, 61 — Sofia.

Начинаючи!

Ржководители на курсове!

като допълнение на курса леко и забавно четиво ви доставя

А НЕКДОТАРО

Цена 10 лева

de Süsseg

Доставя Съюзътъ

Bibliografio

Aŭstria Esperantisto, Wien.
 Oomoto Internacia, Paris.
 Heroldo de Esperanto, Köln.
 Esperanto, Genevo.
 La movado, Paris.
 Schola et Vita, Milano.
 Sennaciulo, Paris, Leipzig.
 Kristana Revuo, Essex, Anglujo.
 International Language, London.
 Sankta Lumo, Makusaka, Japanujo.

Діло, Львів, Україна, № 174.

Amerika Esperantisto, Fort Lee
 U. S. A.

The British Esperantist, London,
 № 317.

Oomoto, Kameoka, Japanujo,
 № 71.

Ondo de Daŭgava, Riga, Latvio,
 № 7, 8.

Katolika vivo, Paris, № 16, 17.

La Espero, Hankow, China, № 7.

Komunikoj por la gazetaro de
 la Internacia Transportlaborista Federacio,
 Amsterdam, Hollando, № 7.

Literatura Mondo, Budapest,
 № 7, 8.

Informoj de Esperanto-Asocio de
 Estonio, Talinn, № 113.

Esperanto Lando, № 4, Nov Jorko,
 USA.

Belga-Esperantisto, № 187, Antwerpen.

Wien kaj malsupra Aŭstrio —
 prospekto.

Domo de Homamo, broŝureto,
 18 pg. prezo: 1 respondkupono, Eldono
 de Oomoto Internacia, 1 rue Felix Faure,
 Paris, 15-e, Francujo.

Pri la prononcado de Esperanto de
 Krista Ludw. Mondlingvo-Eldonejo,
 Katowice, ulica Plebiscytowa 25,
 libreto 30 pg. prezo 0.40 sv. fr.
 Ĉeĥoslovakujo.

Manifesto de la sennaciistoj,
 eldonis sennaciista frakcio el membroj
 de Sennacieca Asocio Tutmonda,

Nov-Jorko, 1931. pg. 32, prezo: 1
 respondkupono.

Paco al vi! de P. Dānov, № 6—7,
 II jaro de biblioteko „Nova Kulturo”,
 Burgas—Bulgarujo.

Prospekto de Budapest eldonita de
 la Ĉefurba Fremdulo-Oficejo okaze de
 la Internacia Turista Kongreso.

Utrechta Esperantisto № 9, Utrecht.

*

Turistaj prospektoj:

Ljubljana — eldonita de la Ljubljana
 komunuma sekcio por fremdultrafika
 propagando. Adreso: Oficejo „Putnik”,
 Dunajska cesta 1 — Ljubljana —
 Jugoslavujo.

Praha — eldonita de la Ĉeĥoslovaka
 Asocio Esperantista sub aŭspicioj de
 Turisma fako de UEA. Adreso: Praha 8,
 Socharská 333.

Budapest — prospekto kaj gvidilo,
 eldonitaj okaze de la Internacia Turista
 Kongreso, 7—15 IX j. k. Oficejo de
 la Organiza Komitato: Budapest, Szerbutca
 2, I emelet 5.

Ĉiuj prospektoj estas senpage riceveblaj
 de la montritaj adresoj.

50% *Rabaton!* 50%

Kontraŭ nur **105 leva** (eksterlande 125)
 sendas la

Plenan esperanto-bulgaran kaj bulgara-esperantan vortaron

kaj la bonegan ilustritan legolibron

Bulgara antologio

— ambaŭ kune enhavantaj pli ol 550
 paĝoj — la aŭtoro-eldoninto

IV. H. KRESTANOV
 Pirdop, Bulgarujo

Profitu tuj la okazon!

Bulgara Esperantista Asocio

L I V E R A S:

la sekvantajn

lernolibrojn, lernilojn kaj esperantaĵojn

1. Lernolibro de At. D. Atanasov — 7 eldono	levoj 25
2. Lernolibro de Esperanto — de D-ro Zah. Zahariev	50
3. Esperanta sintakso por bulgaroj — de D-ro Zah. Zahariev	22
4. Praktika gramatiko	3
5. Konversaciaro	5
6. Anekdotaro de Süsŝer	10
7. Esperanto konkeros la mondon — de D-ro D. Gavrijski — bulgarlingva	12
8. Ĉu estas ebla kaj necesa internacia lingvo — de D-ro lv. D. Ŝiŝmanov	4
9. Kongresparoladoj de Zamenhof — ĉiu po	2
10. Portreto de Zamenhof	10
11. Himno de Esperanto — sur poŝtkarto	2
12. Ŝercoj kaj incitoj	50

Por mendoj pli ol 100 lv. ni rabatas 20^o/_o. Ĉe malgrandaj: ĝis 100 levoj oni aldonu 10^o/_o por afranko kaj sendkosto.

Ĉim nur *antaŭpage!*

Sumojn sendu per poŝtmandato al:
BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
Poŝtenska kutija 233 — Sofia